



# INFORMILO 4

APRILIO 2022 Kol. 443/38

XX

**Enhavo:** Pacsonorilo Mesaĝo de UEA Bestoĝardeno Kokcinevoj  
La forto de la amikeco Kriŝtof-valo Finkalkulo Printempa Grésillon

XX

## Internacia Esperanto-Sonorilo – Pacsonorilo



trovita en Interreto de Inga Johansson.

Tio estas la Esperanto pacsonorilo de Sauerlando, la unua sonorilo de la mondo kun Esperanta surskribo.

”GLORO AL DIO KAJ SUR LA TERO PACO SANKTA FAMILIO PROTEKTU NIN HO DIO DONU PACON KAJ REUNIIGON.”

Friedrich Wilhelm Schilling de Heidelberg fandis ĝin en la j. 1959 por Stockum.

Foto el la arĥivo de

Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando.

Informo el la Fejsbuka paĝo de Internacia Esperanto-Instituto

## **MESAĜO DE UEA AL UN KAJ UNESKO OKAZE DE LA INTERNACIA TAGO DE LA GEPATRA LINGVO**

En la Tago de la Gepatra Lingvo, la 21-a de februaro 2022 Universala Esperanto-Asocio festis la kulturan kaj lingvan diversecon de la mondo. Tiu diverseco estas riĉaĵo, kiun ni devas protekti kaj antaŭenigi. Respekto al lingva diverseco estas vojo al plena observo de homaj rajtoj.

La jaro 2022 markas la komencon de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj 2022-2032, kiu ankaŭ estos traktata de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo, Kanado, en aŭgusto 2022. Sub la temo *Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj*, homoj el dekoj da landoj pritraktos la situacion de indiĝenaj komunumoj kaj iliaj lingvoj. Per la internacia lingvo Esperanto, ni instigas tutmondan dialogon kaj kunlaboron por la konservado, revigligo kaj antaŭenigo de indiĝenaj lingvoj.

Lingvoj estas ĉe la kerno de identeco, komunikado, socia integriĝo, edukado kaj evoluigo. La plej vasta uzado de lingvoj estas vojo al inkluziveco, por ke neniu estu forlasita. En tiu senco, gravas edukado en gepatraj lingvoj, precipe de infanoj, tiel ke ili havu la plej bonan fundamenton por daŭra kleriĝo.

La gepatra lingvo formu la fundamenton de edukado, sur kiu eblos poste akiri aliajn lingvojn por bone funkcii loke, nacie kaj internacie. En tiu rilato, la internacia lingvo Esperanto malfermas pordojn al plene internacia komunumo, kiu kovras la tutan mondon.

Multlingvismo, kiu ebligu kiel eble plej vastan utiligon de gepatraj lingvoj, estas vojo por potencigi edukadon kaj permesi al ĉiuj sin disvolvi. Kompreneble, la edukado alfrontas aliajn defiojn, kiel ekzemple garantii aliron al lernejoj por ĉiuj infanoj kaj bonajn kondiĉojn por instruistoj. Tamen, la lingva demando ĉiam ĉeestas, kaj ne pritrakti ĝin estas grava eraro.

Ni bonvenigas la ĉi-jaran temon de Unesko por la Tago de la Gepatra Lingvo, *Uzi teknologion por multlingva lernado: defioj kaj okazoj*. Teknologio kapablas antaŭenigi multlingvan edukadon kaj la kvaliton de ĝenerala edukado. Tamen, la lingva divido pligrandigas la ciferecan dividon. Ni bezonas multlingvan teknologion por multlingva edukado en multlingva mondo.

La Esperanto-komunumo respektas kaj subtenas lingvan kaj kulturen diversecon tra la mondo kaj la uzadon de gepatraj lingvoj en edukado ĉie.

La mesaĝo estis transprenita el la Gazetaraj Komunikoj de UEA kun peto republikigi ĝin en la lokaj kaj landaj gazetoj kaj aperigi ĝin en aliaj komunikiloj.

## Bestoĝardeno



En la lasta ĉi-februara semajnfino okazis jam tradicia aranĝo Bestoĝardeno, kiun organizas la grupo E-mental'. Ĝiaj membroj decidis jam antaŭ dudek jaroj subteni bestojn en la bestoĝardeno en Prago kaj ĉiujare oni kolektas monon por pagi bredkostojn de kelkaj bestoj.

La rekompenco estas bona sento kaj nomŝildo kun la nomo de E-mental' en la bestoĝardeno. 😊

Ĉiujare febuare aŭ marte ni iras tien saluti niajn bestojn kaj festi la tiel nomatan „adoptofeston“. Ĉi-jare partoprenis pli ol dudek homoj el la tuta lando. Bedaŭrinde la ŝanceliĝemo de kovim-virusaj restriktioj nunjare limigis partoprenon de eksterlandanoj, kiuj en la pasinto abunde venadis.

Jam de longe estas parto de tiu ĉi aranĝo ankaŭ „unubuŝaĵa konkurso“ – tio estas konkurso de bongustaĵoj,



kiam ĉiu partoprenanto preparas bongustaĵojn, kiuj estas formangeblaj per unu buŝ-preno. Kompreneble dum la festo

ne mankas torto kaj komuna kantado de la kanono „Porko vivas“, kiun oni kantas duvoĉe, iam eĉ kvarvoĉe. 😊

La „unubuŝaĵa konkurso“ havas kelkajn kategoriojn. Krom la infana ankaŭ kategoriojn de la plej bongusta kaj de la plej bonaspekta unubuŝaĵo. Kaj ĝuste en la lasta kategorio estis ĉi-jare sukcesaj membrinoj de EK Pardubice, kiuj ricevis diplomon kaj premion! Ni kore gratulas ilin!! 😊



Sed la vivo ne estas nur ŝerco. Dum la renkontiĝo ni babilis ankaŭ pri seriozaj aferoj, kiuj nun turmentas multe da homoj en Eŭropo kaj en la tuta mondo. La renkontiĝon partoprenis ankaŭ Oli el Ukrainio,

membrino de E-mental', kiu jam de pluraj jaroj vivas en Prago. Do ni aŭdis pri la situacio pli, ol diras niaj amaskomunikiloj.

Surloke ni kolektis entute 5100 CZK, kiujn ni sendis al la konto de karitata organizo. 😊

Dimanĉe la renkontiĝo daŭris per boŭla konkurso (globludo, kegloludo). Ankaŭ en tiu ĉi konkurso la gajnintoj ricevis premiojn. 😊 Sed gajninto fakte estis ĉiu, kiu partoprenis!

Ni jam povas antaŭĝoji pri la aranĝo Bestoĝardeno 2023. Kiu volas kun ni subteni bestojn, bonvolu spekti nian Informilon aŭ la retpaĝaron de E-mental' ([www.e-mental.cz](http://www.e-mental.cz)).



Esperantistoj de E-mental‘ ne ĉesigis sian subtenon de viktimoj de la konflikto en Ukrainio post la monkolekto en la bestoĝardeno. Ili helpas al Jana Janovicz el Kievo. En la pasinto ŝi partoprenis jam kelkajn niajn aranĝojn. Oni trovis loĝigon por ŝi kaj ŝia filineto ĉe membroj de E-mental‘, kaj kolektis vivnecesajojn por ili. Por similaj okazoj E-mental‘ fondis bankokonton 2351447014/3030 (por sendi de eksterlando IBAN: CZ4430300000002351447014 / BIC:AIRACZPP). Tie povas subteni nian agadon ĉiu, kiu volas helpi.

J. Tomeček kaj V. Piščíková

## Fabriko de kokcinoj

Tiun ĉi artikolon verkis Paŭlo S. Viana el Brazilo

Kokcinoj estas ĉarmaj insektoj, amataj de infanoj kaj plenkreskuloj, kiuj feliĉiĝas, kiam ili trovas unu el ili en sia ĝardeno. Sed ili ne estas nur ĉarmaj; ili sin nutras per aliaj insektoj kaj povas esti efikaj batalantoj kontraŭ parazitoj kaj aliaj invadantoj, kiuj atakas plantojn.



Pro tio, la administrantoj de la urbejo Belo Horizonte, en la brazila ŝtato Minas Gerais, kreis biofabrikon, kiu vartas kaj disdonas kokcinojn, kun la celo kontraŭagi parazitojn en verdaj lokoj kaj legomĝardenoj en la urbo. Ili funkcias kiel bona alternativo por eviti venenajn substancojn kutime uzatajn tiucele, favore al ekologie sana agrokulturo. Fakte, brazilanoj ne estas pioniroj en tiu iniciato, ĉar en Francujo fakuloj jam antaŭe havis la saman ideon.

La fabrikon oni starigis en la jaro 2018, kaj dum unu jaro oni disdonis proksimume 80 mil kokcinojn. Por 2022 oni planas disdonadon de pliaj 50 mil insektoj. Oni liveras ilin en la fazo de larvoj. Se oni transdonas ilin jam flugipovaj, ili povus forflugi el la celata verda loko. Krome, larvoj estas multe pli manĝemaj kaj pli efike voras parazitajn ol la flugipovaj kokcinojn.

Ĉiu urboganto rajtas mendi la insektojn tra urbodoma servo; oni senpage ricevas ilin en kesto enhavanta ĉirkaŭ 30 larvojn, kun la instrukcioj pri la maniero prizorgi ilin kaj pri la graveco de naturmedia protektado. Tiu sistemo havas do ankaŭ edukan valoron rilate la konsciigon de homoj pri la naturmedio. La biofabriko havas ankaŭ informan agadon en lernejoj kaj invitas homojn al vizitado al ĝiaj instalaĵoj. Multaj homoj interesiĝas pri posedo de etaj hejmaj legomĝardenoj, kiujn oni organizas en skatoloj kaj facile prizorgas, eĉ en negrandaj lokoj. Estas plezuro sin nutri per tiaj hejmaj, senvenenaj legomoj kaj folioj kaj estas aldona plezuro, se la ĝardeneton ornamas belaj, koloraj kokcinojn.

Kokcinojn estas koleopteroj, do insektoj similaj al skaraboj. Ili havas plej ofte ruĝan karapacon kun nigraj makuletoj, sed ekzistas alikoloraj. Ilia nomo devenas de la latina coccinus, kiu signifas “skarлата”. Ekzistas 6 mil specioj de kokcinojn. Ili sin defendas kontraŭ predantoj per eligado de flava, malbonodora likvaĵo.

Laŭ popola tradicio, oni kredas, ke la simpatiaj kokcinojn transdonas feliĉon, bonan sorton kaj serenecon.



## **La forto de la amikeco** de Paŭlo Sergio Viana.

Bonaj amikoj alportas amuziĝon, sed ili ankaŭ plifortigas la sanon kaj mildigas streson. Esploristoj pri interhomaj rilatoj trovas pli kaj pli da motivoj, kial oni bone traktu amikecojn.

Kanada studaĵo kun proksimume 25 000 homoj konfirmas la bonfartigan efikon de amikecoj. Testpersonoj kun amikoj sentis sin malpli stresitaj kaj pli sanaj ol tiuj, kiuj ne havis amikon. Ilia bonfarto restis daŭre alta, precipe tiam, kiam ili renkontis siajn amikojn ofte persone kaj ne nur telefone parolis kun ili aŭ nur babilis kun ili en la interreto.

Komunaj agadoj kiel kuirado, komuna vizito al trinkejo aŭ simple nur babili sur sofo, tio vere altenpuŝas la memkonscion. Tion montras ankaŭ germana-nederlanda esplorista teamo. En blogo 241 germanaj gestudentoj ĉiutage raportis dum tri semajnoj, ĉu ili renkontis amikojn, kiom ili amuziĝis ĉe tio kaj kiel personeca la renkonto estis por ili. Samtempe ili devis ĉiutage prijuĝi sin mem kaj indiki, ĉu ili konsideras sin valora homo.

Fakte la partoprenantoj en tiuj tagoj vidis sin en pli pozitiva lumo, dum kiuj ili estis entreprenintaj ion kun la amikoj. Tiuj testpersonoj, kiuj renkontis amikojn sufiĉe ofte dum la tuta daŭro de la studado, havis entute pli fortan memvalorsenton ol homoj, kiuj emas retiriĝi. La renkonto tamen stimulis la bildon pri si mem nur se la testpersonoj kune bonfartis ĉe la rendevuo.

La psika bonfarto en amikeco ekestas per pozitivaj interagoj kiel konversacioj aŭ kinovesperoj, sed ankaŭ per emocia helpo. Oni



tiam demandas sin, ĉu la alia en krizaj momentoj vere estas ĉe mi. Tiam li estas vera amiko.

Aliflanke soleco povas kaŭzi malsanon - ankaŭ korpan. Kiel forta la efiko estas, tion montras jam esploroj el la milnaŭcent-sepdekaj kaj -okdekaj jaroj. Esploristaj grupoj observis ke homoj sen malvastaj rilatoj mortas pli frue ol homoj kun proksimuloj.

Homoj, kiuj zorgas pri siaj amikecoj, tamen havas ne nur avantaĝon rilate al pli longa vivo – ili ĝuas sub certaj cirkonstancoj ankaŭ pli bonan protekton kontraŭ psikaj malsanoj. Dum krizaj periodoj estas rekomendinde serĉi la interparoladon kun amikoj aŭ familianoj. La sperto de proksimulo povas malfermi novan perspektivon en la prijuĝo de la situacio. Ĉiu malsukceso estas ankaŭ ŝanco por bona rekomenco.

Jam ĉe la infanoj troviĝas tiu efiko. Kanadaj esploristoj analizis 10-jarulojn, kiuj en si portis genetikan riskon malsaniĝi je depresio. Jam sola bona amiko sufiĉis por signife redukti la probablecon, ke la malsano manifestiĝas. Aliaj studaĵoj montras, ke interinfanaj amikecoj povas eĉ mildigi la konsekvencojn de mistraktadoj en lernejo aŭ en la gepatra hejmo. Bonaj amikoj povas ankaŭ anstataŭi bonajn rilatojn al familianoj. Ne gravas havi multajn amikojn, sed ja gravas havi bonajn amikojn.

## **Fervojo trans Krištof- valo.**

La viadukto proksime de la ĉeĥa urbo Liberec. Ĝi staras



jam pli ol cent jarojn kaj ankoraŭ ne falis kaj aspektas kvazaŭ oni konstruis ĝin nun.

Fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcento estis konstruata fervojo el la urbo Lovosice tra la urbo Česká Lípa al Liberec. Kaj kiel lasta estis konstruata, en la jaroj 1899 – 1900, tiu fervojo en malfacila tereno el la urboj Mimoň al Liberec. Parto de tiu konstruado estis ankaŭ kelkaj tuneloj kaj ĉefe konstruado de la ŝtona viadukto trans la vasta Krištof-valo ĉe la civito Novina. Ĝi estas 230m longa kaj ĝia pleja alteco estas 29 m. Veturo sur tiu interesa fervojo estas vera travivaĵo, ĉar ĉiu kilometro de tiu vojo alportas belegajn elrigardojn en la ĉirkaŭaĵon jam de la urbo Litoměřice al Česká Lípa kaj ĉefe pluen al Liberec. Kiam vi sidas en trajno, kiu veturas sur tiu viadukto kaj rigardas el fenestro, en iuj momentoj al vi ŝajnas, ke vi flugas en sporta aviadilo super la pejzaĝo. Aŭtune la viadukto ŝajnas esti preskaŭ perdita en la kolora ĉirkaŭa naturo .

La viadukto estas enskribita en la katalogo de naciaj teknikaj memorindaĵoj.

En la civito en Krištof-valo, proksime de tiu viadukto, staris malnova konstruaĵo, en kiu estis transformatoro, kiun oni volis detrui. La lokaj civitanoj kune kun aliaj helpantoj dum la jaroj konstruis en ĝi astronomian turhorloĝon, la trian en Ĉeĥio, post tiuj en Prago kaj en Olomouc. La turhorloĝo havas 22 figurojn, plejparte moveblajn kaj certe estas interese vidi ĝin dum turisma vagado en la regiono ĉirkaŭ Liberec.



El la interreto tradukis L.S.

## Finkalkulo de AEH de la jaro 2021 + budĝeto por la jaro 2022

	<b>budĝeto 2021</b>	<b>realo 2021</b>	<b>budĝeto 2022</b>
<b>Enspezoj</b>			
dotoj, donacoj	10 000	6 450	10 000
membrokotizoj	20 000	19 214	20 000
seminarioj	0	0	0
ekskursoj	0	0	0
<b>Sume</b>	<b>30 000</b>	<b>25 664</b>	<b>30 000</b>
<b>Elspezoj</b>			
materialo	6 000	737	6 000
poŝto, telefono, interneto	15 000	15 977	15 000
riparoj, servoj	5 000	2 000	5 000
gazetoj, libroj	500	0	500
kunvenoj	500	0	500
vojaĝelspezoj	1 000	0	1 000
banko	0	0	0
seminarioj	0	0	0
ekskursoj	0	0	0
dotoj, donacoj	1 000	700	1 000
<b>Sume</b>	<b>29 000</b>	<b>19 414</b>	<b>29 000</b>
<b>Enspezoj - elspezoj</b>			
	<b>1 000</b>	<b>6 249</b>	<b>1 000</b>

Petr Angelov p.p.m.  
prezidanto de AEH

Ing. Stanislava Nováková p.p.m.  
kontistino de AEH

Karaj,  
la intensiva studperiodo "Printempas" en Grésillon, post paŭzo de du jaroj, okazos en 2022 en la tagoj 22.-29. aprilo espereble kun vi!

Niaj talentaj kaj junaj instruistoj preparos vin al KER- ekzamenoj. Legu en <https://gresillon.org/printempo>

Jannick HUET

Belegan printempon kaj agrablan travivon de Pasko deziras al ĉiuj niaj legantoj

Mirka kaj Ludmila



**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**

Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,  
530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: [aeh@esperanto-aeh.eu](mailto:aeh@esperanto-aeh.eu) interreto: [www.esperanto-aeh.eu](http://www.esperanto-aeh.eu)

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky 2010

**IBAN:** CZ352010000002801322017SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.